# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

2/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13 Marto-Aprilo

## ĜENERALA KUNVENO

## OLTEN, SABATON 14-AN DE MARTO 1992

## HOTELO EMMENTHAL (SUDE DE LA STACIDOMO)

10h00: Kafumado, renkontiĝaj babiladoj kaj libroservo.

**11h00 precize: Malfermo de la Ĝenerala Kunveno**

**Tagordo:**

**a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno** aperinta en SI majo 1991.

**b) Raporto de la Centra Komitato** aperinta en SI marto 1992.

**c) Statut-ŝanĝoj** proponitaj en la Raporto de la Centra Komitato.

**ĉ) Financa raporto** aperinta en SI marto 1992.

**d) Raporto de la kaskontrolantoj** aperinta en SI marto 1992.

**f) Buĝeto por la jaro 1992 kaj kotizoj por la jaro 1993.**

**h) Diversaĵoj.**

**12h30: Komuna tagmanĝo** (bonvolu vin antaŭanonci ĉe la sekretario laŭ la indikoj donitaj en SI januaro 1992.

**14h30: Distra programo:**

Okazos du paralelaj aranĝoj:

a) 1952-1992: Claude GACOND jubileas sian 40-jariĝon en esperantujo. Li rakontos per akompano de lumbildoj pri la eventoj, verkoj kaj personecoj, kiuj lin plej multe influis.

b) Promenado tra la malnova Olten gvidata de Marion GROSJEAN, la prezidantino de JES.

**15h30: Konkludo** kaj teumado, antaŭĝisrevidaj babiladoj kaj libroservo.

**16h00: Fermo de la renkontiĝo.**

La prezidanto esperas vin vidi multnombrajn en Olten.

NEKROLOGO

La 1-an de decembro 1991 mortis, en la aĝo de 94 jaroj, Paul Enz el Zürich. Aldone al la konciza informo en SES INFORMAS 6/91, mi direktas hodiaŭ la rigardon al liaj aktivecoj. Por ni Esperantistoj Paul Enz estis tre aktiva persono. En la komenco de la 1920-aj jaroj li lernis la internacian lingvon Esperanto. Tuj poste li aliĝis al la Esperanto-Societo Zürich kaj al la Svisa Esperanto-Societo kaj al UEA. En la Svisa movado, en ESZkaj SES, li baldaŭ transprenis diversajn taskojn. En la kunvenoj li estis volonte vidita gasto. Paul Enz ĉiam montris enviindan sintenadon kontraŭ ĉiuj. Helpopreteco estis lia forto kaj la celado al harmonio kaj konkordo oni sentis en lia proksimeco. La grupo Zürich perdis per lia forpaso honestan kaj sinceran kamaradon, kiun ni tenas en bona memoro. En la Svisa Esperanto-Societo li ankaŭ kunlaboris en la Centra Komitato.
Krom en Esperantujo li forte laboris en kooperacio por prezfavoraj loĝejoj por familioj kun malaltaj salajroj. Malgraŭ grandaj malfacilaĵoj li ne perdis la kuraĝon, sed senlace klopodis atingi la fiksitan celon. Ankoraŭ hodiaŭ multaj familioj profitas de lia iama energio kaj celkonscio.
En la krizaj jaroj li estis helpopreta al metiistoj de mal- kaj mezgrandaj entreprenoj kaj fondis, kun kelkaj helpantoj, en la jaro 1934, en liber-ekonomia senco, la kooperativon "Ekonomia Ringo" (Wirtschaftsring/WIR), kiu garantiis al la menciitaj entreprenoj reciprokajn negoc-agadojn, sed por la bona funkciado li, dum certa tempo, eĉ senpage laboris. Tio signifis por la familio drastan ŝparadon. Malgraŭ tio estis ĉiam malferma domo ĉe la familio Enz. Gastoj ĉiam estis bonvenaj, regalitaj kaj loĝigitaj. Inter ili multaj el la eksterlando. En unu sola somero ni nombris ne malpli ol 75 tranoktantojn.
Laborriĉa vivo estingiĝis kaj restas la memoro al sincera amiko.

-FL-

OOoOO

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL: en restoracio Mägd.
26.3.20.00h Monata kunveno. Prelego kun lumbildoj pri: "GREKLANDO EN PRINTEMPO". Parolos s-ro Hans-Peter Senn.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:
En restoracio "AL FORNO", Spitalgasse 37.
3.3.19.30h kaj 7.4.19.30h

ESPERANTOGRUPO "LA STELO" GENÊVE:
Institute National Genevois, Prom.du Pin.
28.2.20.00h Monata kunveno.
1. Duonhora studado de Esperanto laŭ la libro "Paŝo al plena posedo" de W. Auld.
2. "Astrologiaj prognozoj por 1992". Parolos A. Stakian.

27.3.20.00h Monata kunveno.
1. Duonhora lingvostudado
2. ĝenerala kunveno de LA STELO.

ESPERANTOKLUBO WIL:
Restoracio Schweizerhof, Unt.Bahnhofstr. 18.
11.3.20.00 Ni legos "LITERATURAN FOIRON". Prelegos Ernesto von May. (2-a merkr)

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:
9.3.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Prelego pri: "La historio de N.I. Sekvojo kaj la 500-jara persekutado de la Indianoj". Parolos Birgita Holenstein.
13.4.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Prokrastita programo, "Tago de la Libro". S-ro Weidmann parolos pri 2 interesaj libroj.

ESPERANTO-JUNULARO ZUERICH: En Drahtschmidli.
30.3.19.00h kaj 27.4.19.00h

ESPERANTO-GESTUDANTOJ ZUERICH:
ĉe D. Weidmann, Florastrasse 17, 8008 Zürich.
ĉiun mardon je la 19.00h.

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE: En la popoldomo.
2.3.20.30h Prelego pri: "INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTO EN LA CARA IMPERIO KAJ SOVETUNIO". Parolos s-ro Andy Künzli.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

En rest. BIG BEN Winkelriedstr.39

4.3.14.00h Granz Brügger: Paroliga kunveno.

11.3.19.30h en rest. Johanniter Bundespl.Luzern, Unue diskutado kaj poste parolado pri: "SVISAJ ESPERANTO-PIONIROJ" Parolos s-ro Claude Gacond.

14.3. sabato 10.00-16.00h ĜENERALA KUNVENO de SES en Olten, Konferencejo Emmental Tannwaldstrasse 34. Trajna ekiro de Luzern 08.56h.

1.4.14.00h en rest. BIG BEN Winkelriedstr.39. Franz Brügger: Paroliga kunveno.

2.4. Paul Scherer: Kiel diskonigi nian societon ?

23.4.19.45h kolektiĝo ĉe la Bus-Stacio "LINDE" en Kriens, de kie aŭtomobilistoj veturigos nin al la hejmo de ge-roj Lutz Himmelrichstr.61. Tie ni ĝuos la prezentadon de memfarita videofilmo "EGIPTIO"'

SAEF/IFEF:

La 44-a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazos de la 16-a ĝis la 22-a de majo en Münster/vestfalio Germ.

* * *

DONACOJ

En la duona duono de la jaro 1991 SES ricevis financan subtenon de:
Paula Schaufelberger 100.-, L.Dovat 40.-, L.Dahan 50.-, T.Gamper 20.-, L.Schärrer 50.-, anonima donacinto 30.-, D.Hemmann 6.-, R.van Puijenbrock 10.-, D.Rooke 50.-, W.Gasser 50.-, D.Bühlmann 50.-, J.Tomaszczyk 15.-, P.Ruchti 10.-, W. Laederach 20.-, G.Gacond 6.-, W.Läderach 10.-, G.Appius 12.20, W.Giannini 70.-, A.Koller 20.-, Ed.Muster 50.-, J.N.Friot 50.-, D.Bühlmann 50.-, F.Gabbrielli 20.-, C.Gacond 400.-
La Svisa Esperanto-Societo sincere dankas pro la valoraj kontribuoj.

* * *

KIOM LERNI POR SCII ESPERANTON ? IV.

Tiu racie elpensita lingvo, per siaj radikoj kompleteblaj per literoj aŭ silaboj formas tuton, kiun oni devas unue komplete lerni. La kurso prezentita en la FUNDAMENTO (ekzercaro) prezentas ĉirkaŭ 800 elementojn. Lernante dek el ili ĉiutage, vi povas ankoraŭ aldoni 700 radikojn el viaj legadoj por akiri 1500 erojn dum duonjaro, kaj akiri sufiĉan nivelon por paroli kaj labori. La universala vortaro de la Fundamento entenas ĉirkaŭ 3000 radikojn, uzeblaj por diversaj fakoj aŭ scienco. Vi elektos laŭ viaj profesiaj bezonoj.

Sed Esperanto devas fariĝi helpilo por rilatigi la diversajn popolojn, ĉu ŝtataj, ĉu minoraj, eĉ ĉu rifuĝitaj. Se ĉiu instanco petas du agentojn aŭ delegitojn kune lerni Esperanton, fine de la jaro ili povas jam fariĝi rilat-agentoj, tradukante esperantlingven informojn aŭ petojn de siaj superuloj, aŭ kontraŭe, transmeti informojn venintajn de alilingva aŭtoritato. Ĉiu faka Esperantisto povas proponi sian helpagadon: Ĉe esperanta grupo por paroligi lernantojn, informi hezitantojn, instrui, verki, fariĝi redaktoroj!

En la ekonomia vivo ankaŭ Esperanto estu ĉie ĉeestanta. Magazeno kun verda stelo surporde povas akcepti novan klientaron; industrioj, komercoj, povas rilati kun alilandaj fakuloj. Ŝtatoj, kiuj decidis mallevi landlimojn ne ankoraŭ trovis la bonan vojon por vivi pace kun minoritatoj internaj, kvankam lingvo, kiel religio, devus esti pli persona ol ŝtata apartaĵo. Se nova Eŭropo grupigos 35 lingvojn, kaj la nova mondo eble 200, ni ne devas atendi akcepton de alia universala lingvo ol Esperanto, despli ke je la komenco cento da interpretistoj por Eŭropo, kaj 400 por la tuta mondo sufiĉos por elprovi tian rilatsistemon. -RWP-

Fino de tiu-ĉi serio de s-ro René W.Perrenoud.

* * *

## RESPONDO AL LA PROTESTLETERO EN "SI" 1/92

Kiel aktiva membro de paca movado mi protestas pri la "protestletero" al (jugoslavia) ambasadoro, publikigita en "SI" 1/92. Antaŭ ĉio mi konsideras tiun leteron grava nerespekto de neŭtraleco de SES, kies ano ĝis nun, mi ankoraŭ estas.

Mi tute ne kontraŭas apelaciojn por paco aŭ homaj rajtoj, sed interveni por unu partio, en lando, kie bedaŭrinde regas intercivitana milito, mi konsideras simple ne respondeca, flanke de organizo kiel SES.

En la tikla situacio, kiu nun regas en eksa Jugoslavio, ni povas bone imagi, ke ekzistas ankaŭ serbaj homoj kaj inter ili ankaŭ geesperantistoj, loĝantaj en kroatiaj teritorioj, kiuj estiĝis senkulpaj viktimoj de kroataj milicanoj, subtenantaj de faŝisemaj batalantoj, kiel "Ustaŝia" aŭ fremdaj dungosoldatoj, laŭ informo de svisa gazetaro kaj televido.

Ni estas informitaj pri abomenaj okazintaĵoj kontraŭ civiluloj, faritaj de ambaŭ kontraŭuloj, serboj kaj kroatoj, laŭ la kruela logiko de ĉiuj intercivitanaj militoj.

Nia devo, kiel esperantistoj, devus esti apogi ĉiujn pacemajn homojn en eksa Jugoslavio, kiuj klopodas por pacaj solvoj, sed ne fariĝi juĝistoj kaj minaci punon, kiel evidentiĝas en via protestletero.

Kun amikaj salutoj
Carlo Nicolodi, Allschwil

* * *

## DEZIRAS KORESPONDI

245110 Juri Korsun
P.Box 7, Shostka-7
Sumska obl
Ukrajnio

245110 Kolja Puda
per.Proreznoj 4/19
Shostka Sumska obl
Ukrajnio

* * *

## 10 MENSCHEN - 10 SPRACHEN - 10 MINUTEN
## 10 HOMOJ - 10 LINGVOJ - 10 MINUTOJ

---

Tio-ĉi estis la originala nomo de vespera spektaklo, vendrede, la 3-an de januaro 1992, en "Kulturfabrik" (kultura fabriko) en Wetzikon, organizita de s-ro Jörg Lenzlinger, membro de "Kunstszene 91+92". Ĉar li volis enprogramigi ankaŭ Esperanton, li trovis s-ron Liechti, sed ĉar Fritz Liechti, pro malsano, ne povis ion prezenti, li fine trovis du lucernanojn. Do, s-ro Franz Brügger preparis dialogon en kaj pri Esperanto -- kaj mi estis la partnero. Mi faris demandojn en mia dialekto pri gramatikaĵoj kaj Franz Brügger respondis en Esperanto. Estis atenta publiko de proksimume 60 personoj. Inter ili ankaŭ troviĝis ĵurnalistoj. Unu el ili, en la ĵurnalo "Der Zürcher Oberländer", aperigis jenon pri nia prezentado:
"Franz Brügger kaj Paul Scherer, per ilia "Dialogo en kaj pri Esperanto", enkondukis en la por la kompreniĝo inter diverslingvaj partneroj kreitan artlingvon, klarigante la simplan konstruon de tiu lingvo, kiu baziĝas en siaj vortradikoj sur 20 eŭropaj lingvoj kaj enhavas neniujn senregulecojn kaj esceptojn. La mirigita publiko povis rapide kompreni tutajn frazojn, kompreni la karakteron de tiu artefarita lingvo".
Por kompreni la koncepton "10 homoj, 10 lingvoj, 10 minutoj" mi ĉi-tradukas la klarigojn, kiuj troviĝis sur la anoncilo:
"Mallongaj kontribuoj en plej diversa maniero vekas scivolemon rigardi malantaŭ la lingvon. La vespero eblas al 10 homoj fari dekminutajn manifestaciojn. Per la konfrontado de plej diversaj realaĵoj la ofte ne atentita riĉeco de esprimformoj povas esti perceptita kaj akceptita. Ludeca prilumigo de la vojoj de la pensado kun ĉiuj malakordoj de nia tempo".
Kaj por vere kompreni la diversecan programon, mi volonte mencias la scenon de nia blinda samideano Martin Meyer el Zürich. Sub la nomo "Promenado" li perbuŝe aŭdigis al ni sonojn kiel ekz pason de trajno kaj de ŝipo, ktp.

-Paul Scherer-

## "ESPERANTO" TROVEBLU SUB LA LISTO "E" EN TELEFONLIBROJ SUB ĈIU VILAĜ- KAJ URBONOMO

Jam en pluraj telefonlibroj svisaj sub pluraj vilaĝ- kaj urbonomoj troveblas la vorto "ESPERANTO" kun nomo kaj adreso de esperantisto.
Tio havas plurajn avantaĝojn:
Unue, iu turisto esperantista povas rapide kontakti samideanon kaze de demando, problemo, malsaniĝo ktp.
Due, iu samurbano eble deziras informojn pri Esperanto kaj tiel li/ŝi povas tuj havi kontaktojn kun esperantisto.
Trie, se iu traserĉas ion en la telefonlibro, li/ŝi tralegas plurajn kolumnojn kaj hazarde legas la vorton "Esperanto". Eble li/ŝi ne konscios pri tio. Eble li/ŝi tiam ekscios, ke Esperanto ekzistas kaj povos utili.

## KONKRETE, KIEL FARI ?

Unue vi kontrolu pri via vilaĝo/urbo en la telefonlibro. Ekzemple en Lausanne staras la nomo de unu esperantisto, en Ĝenevo de 5 esperantistoj.
Se, pri via urbo/vilaĝo, nenio staras inter Espa... kaj Espi..., vi povas facile organizi, ke legiĝos io pri Esperanto. Serĉu komence de la telefonlibro la paĝon 10, tie la rubrikon "Eintrag im Telefonbuch", "Inscription dans l'annuaire", "Iscrizione nell'elenco". Plenigu ĝin kaj sendu ĝin al la ĝenerala direktejo de PTT de via sektoro. Vi trovas la liston de la direktejoj sur la enmetita koverto paĝo 11.
Apud la vorto "Esperanto" staros via nomo, antaŭnomo kaj adreso. Via kosto estas 12.- por du tekstlinioj por ĉiu eldono, kiu estas proksimume dujara. Eta sumo por taŭga varbado!

Mireille Grosjean

* * *

# FINANCA RAPORTO

La jaro 1991 konkludiĝis per pozitiva saldo, ĉefe ĉar SES nenion elspezis por la propagando kaj varbado. Tio espereble ne ripetiĝos en 1992. La SES-membraro tendencas maljuniĝi, kio klarigas ĝian malkreskon. Dum en 1989 rikoltiĝis 201 jarkotizojn, en 1990 enkasiĝis nur 132 kaj en 1991 144. Tiu kresko de 12 membroj en la pasinta jaro espereble antaŭanoncas gajnon de novaj fortoj.

La ciferoj, kiujn vi trovas en la bilanco 1991-a respegulas la etecon de niaj financaj rimedoj. La buĝeto 1992-a, kiel tiu de la pasinta jaro, antaŭvidas deficiton, kiun ni povas riski pro la ekzisto de kapitalo, kies du trionoj estas investitaj ĉe Gastejo Edmond Privat.

Estas malfacile buĝeti donacojn. Tamen nia espero estas, ke multaj SES-anoj apogos nian aktivecon per donacoj, kiuj kontribuos al la etiĝo de la buĝetita deficito 1992-a.

Kvankam SES estas eta societo, ni scias, ke ĝia librotenado tamen signifas multe pli da laborhoroj, ol ni imagas. Demandita pri tio nia kasisto respondis, ke li dediĉas meznombre po unu horon tage al SES. Li estu vigle dankata pro tiu utila sindono, kaj li havu la ĝojon registri multajn novajn nomojn inter la kotizantoj 1992-aj.

Ankaŭ niajn kaskontrolantojn ni danku kaj sekve al ilia raporto, ni malŝarĝu nian kasiston Ernst VON MAY per akcepto de lia librotenado 1991-a kaj de la buĝeto, kiu gvidos lian librotenadan laboron en 1992.

Via prezidanto: Claude GACOND.

-oOo-

Malpacienco ruinigas grandajn planojn!

oOo

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

# B I L A N C O   1 9 9 1

| Jarkalkulo | Buĝeto 91 | Enspezoj | Buĝeto 92 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 7'500.- | 5'605.- | 6'500.- |
| Abonoj LF kaj SI | 300.- | 122.- | 150.- |
| Donacoj | 1'000.- | 1'173.20 | 1'000.- |
| Interezoj SKA k. GEP malnetaj | 2'500.- | 2'721.- | 2'600.- |
| Enspez-sumo | 11'300.- | 9'621.20 | 10'250.- |
| | | Elspezoj | |
| Literatura Foiro LF el GEP k. SKA | 5'000.- | 4'604.80 | 4'000.- |
| Svisa Esperanto-Societo Informas SI | 2'000.- | 1'271.15 | 1'600.- |
| UEA Kotizo | 100.- | 66.- | 80.- |
| Propagando, varbado | 5'000.- | -- | 5'000.- |
| CK administrado | 2'500.- | 1'637.15 | 2'000.- |
| Kunvenoj ĝeneralaj, regionaj, junularaj | 800.- | 816.40 | 1'500.- |
| Bankspezoj k. Diversaĵoj | 500.- | 242.80 | 300.- |
| Argus | 1'000.- | 532.05 | 1'000.- |
| Subvencioj al JES | -- | -- | 1'000.- |
| Elspez-sumo | 16'900.- | 9'170.35 | 16'480.- |
| GAJNO + / PERDO - | - 5'600.- | + 450.85 | - 6'230.- |

| Kapitalo | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|
| Gastejo Edm. Privat, konto 079 | 42'674.30 | |
| Inventaro | 1.- | |
| SKA konto kuranta | 23'621.65 | |

| | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| Junulara vojaĝfonduso | | | 259.50 |
| SKA antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 952.35 | |
| Transaj eroj aktivaj k. pasivaj | | | 790.- |
| Kapitalo je 01.01.91: | 65'748.95 | | |
| Plus GAJNO kiel supre | + 450.85 | | |
| Kapitalo je 31.12.91: | 66'199.80 | | 66'199.80 |
| | | 67'249.30 | 67'249.30 |

| Reserva kapitalo | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| SVB kasobligacioj (repagitaj en deponan konton) | | 0'000.- | |
| SVB depona konto | | 10'748.35 | |
| SVB antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 181.40 | |
| Reserva kapitalo je 01.01.91: | 10'023.05 | | |
| Plus interezoj malnetaj | + 945.80 | | |
| Minus bankspezoj | - 39.10 | | |
| Reserva kapitalo je 31.12.91: | 10'929.75 | | 10'929.75 |
| | | 10'929.75 | 10'929.75 |

La kasisto: Ernst von May, Oberuzwil, 91-12-31

SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)

Revizora raporto 1991

La subskribintoj,

Margrit Guldin, Murtenstr. 1, 3008 Bern kaj
Ernst Glättli, Laurstr. 17, 5200 Brugg,

kunsidis la 6-an de februaro 1992 en la domicilo de la SES-kasisto, s-ro Ernst von May en Oberuzwil, por revizii la librotenadon de Svisa Esperanto-Societo (SES).

Ni certigis nin pri

- la ĝusta transskribo de la saldoj el la pasintjaraj kontofolioj,
- la laŭorda enskribo de en- kaj elspezoj surbaze de ekzistantaj pruviloj,
- la korekta transskribo de la konto-saldoj en la bilanco-kontojn.

La bankkonto-eltiroj de SKA kaj SVB je 31.12.1991 estis je dispono de la revizoroj kaj konfirmis la ekzistadon de la aktivoj specifikitaj en la bilanco.

La skriba konfirmo pri la jarfina saldo de la konto "079 GEP" (Gastejo Edm. Privat) ne ankoraŭ atingis la kasiston. Laŭ noto de s-ro von May la librotenisto de GEP telefone antaŭanoncis la konto-saldon kaj promesis sendi la skriban konfirmon. S-ro von May kontrolos la eniron de la skriba konto-eltiro.

| | | | |
|---|---|---|---|
| La jarkalkulo 1991 prezentas | enspezojn | de | Fr. 9'621.20 |
| | elspezojn | de | Fr. 9'170.35 |
| El tio rezultas | gajno | de | Fr. 450.85 |
| La bilanco je 31.12.1991 atestas | aktivojn | de | Fr. 67'249.30 |
| | pasivojn | de | Fr. 1'049.50 |
| Rezultas je 31.12.1991 | kapitalo | de | Fr. 66'199.80 |

Al SES plue apartenas:

Reserva kapitalo (iama elkongresa kapitalo)

| | | | |
|---|---|---|---|
| La koncerna konto ĉe SVB montras je 31.12.1991 | havaĵon | de | Fr. 10'929.75 |

La kaskontrolantoj povis konstati, ke la librotenado estas modele farita. Ili proponas al la ĝenerala kunveno aprobi la jarkalkulon 1991, malŝarĝi la Centran Komitaton kaj danki al nia fidela kasisto, s-ro Ernst von May, pro la zorgeme plenumita tasko dum la jaro 1991.

Bern kaj Brugg, la 7-an de februaro 1992 La kaskontrolantoj:

E. Glättli

Margrit Guldin

# RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO

## Literatura Foiro & Svisa Esperanto-Societo informas

Dum la jaro 1991, pere de la reagoj de niaj membroj esprimitaj okaze de leter-interŝanĝoj aŭ dum aranĝoj, ni scias, ke la sinteno al la nova formulo **Literatura Foiro + SES informas**, unue skeptika, fariĝis pli kaj pli pozitiva kaj eĉ entuziasma. Tial la Estraro de la Centra Komitato, en sia kunsido de la 12-a de oktobro 1991, decidis daŭrigi la eksperimenton en 1992. Niaj dankoj iras al Perla MARTINELLI, la ĉefredaktorino de **LF** kaj al Fritz LIECHTI, la redaktoro de **SI**, pro la kvalito de ilia laboro. En **LF** ĉiu trovas ion legindan kaj la beleco kaj alta nivelo kultura de tiu revuo donis al multaj SES-anoj novan kuraĝon kaj fieron. Kaj **SI** alportas la necesan informan komplementon laŭ nivelo ankaŭ tute kontentiga. La jaro 1992 certe vidos novajn progresojn, kiuj donos novajn fortojn al nia societo. Ni ne forgesu danki ĉiujn verkintojn de artikoloj kaj ni antaŭdankas ĉiujn, kiuj jam nun pretigas kontribuaĵojn por la venontaj numeroj.

## Statut-ŝanĝoj

En la tagordo de la Ĝenerala Kunsido okazonta en Olten je la 14-a de marto 1992 ni revizios la statutan paragrafon 21-an, kiu temas pri la **gazeto**, kiun la SES-membraro ricevas. Tiu ĉi artikolo tekstu:

**21. GAZETO: Svisa Esperanto-Societo zorgas pri liverado de periodaĵo(j) al siaj membroj. Ĝia aŭ ilia abono estas inkluzivita en la kotizo. La Centra Komitato elektas la plej konvenan solvon kaj rilatas kun la redaktoroj.**

En la statuta paragrafo 7-a la vortojn " organo Svisa Esperanto-Revuo" anstataŭu la vortoj "**la informilo de SES**".

Ĉar devos okazi statut-ŝanĝo, ni profitas proponi kelkajn aliajn plibonigojn, kiuj pli konformigos nian statuton al la realeco.

Al la paragrafo 7: KONSISTO, ni aldonu la indikon:

f) Honoraj membroj kaj estraranoj ne pagas kotizon.

La paragrafo 17: CENTRA KOMITATO estu tiel reformulita:

ESTRARO KAJ CENTRA KOMITATO: La Estraro (E) kaj la Centra Komitato (CK) estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. La Estraro konsistas el minimume 3 elektitoj fare de la Ĝenerala Kunveno. La Estraro rajtas alelekti pliajn membrojn. Ĉiuj kune formas la Centran Komitaton (CK).

Koncerne la statutan paragrafon 20-an titolitan KONFLIKTO-KOMISIONO la Centra Komitato en sia kunsido de la 8-a de februaro 92 alvenis al la decido, ke nur okaze de konflikto elektiĝu tri arbitraciantoj fare de la Centra Komitato mem. Tial ne estas proponitaj du kandidatoj por anstataŭi la demisiintojn Alfred WENGER kaj Fritz LIECHTI kaj ankaŭ tial ni proponas novan formuladon de la statuta paragrafo 20 b):

La Konflikto-Komisiono konsistas el minimume tri arbitraciantoj, kiujn elektas la Centra Komitato, se alvenas plendo. Tiuj arbitraciantoj ne necese devas esti membroj de Svisa Esperanto-Societo.

Kiuj ne posedas plu ekzempleron de la statuto de Svisa Esperanto-Societo, tiuj ĝin skribe aŭ telefone petu al la prezidanto aŭ sekretario.

## Kunsidoj

La prezidanto kaj la sekretario sin ofte renkontis en La Chaux-de-Fonds, en Lucerno kaj en Berno. La 12-an de oktobro okazis kunsido de la Estraro de la Centra Komitato en Olten. Kaj la 8-an de februaro, ankaŭ en Olten, kunveno de la Centra Komitato. En tiuj renkontiĝoj ekzameniĝis la necesaj statutŝanĝoj, decidiĝis la datoj kaj programoj de la venontaj aranĝoj, diskutiĝis la aktivecoj de nia societo, ktp.

## Regionaj kulturaj semajnfinoj

En **Lucerno**, post la Ĝenerala Kunveno okazinta je la 23-a de marto 1991, bela programo estis proponita. Ĝi

ebligis interalie viziti la luksan hotelon Ŝvejcerhofo, kie restadis Leo Tolstoj en 1857. Dum memorinda kafo-kunsido ĉiuj ĝuis en belega salono pri la prelego, kiun Andy KÜNZLI faris koncerne la restadon de la rusa verkisto en Lucerno. Ni povis eklegi en la februara numero de **LF**, kion pensis Tolstoj mem pri la gastoj de tiu hotelego. Dankon al nia sekretario kaj al la membroj de Lucerna Esperanto-Societo por tiu agrabla semajnfino, kiu estis ankaŭ dediĉita al lingvo-studaj momentoj en tri grupoj kaj al literatura kaj muzika vespero.

La 5/6-ajn de oktobro 1991 en **Pully apud Lausanne** festiĝis la 700-a jubileo de Svislando per prelegoj de Claude GACOND, Alain FAVRE kaj Tazio CARLEVARO dediĉitaj al la disvolviĝo de la svisa neŭtraleco, al la rilatoj inter Savojo kaj Svislando kaj al la statuso de la itala lingvo en la svisa vivo. Nia espero estas, ke tiuj interesaj prelegoj iel respeguliĝos artikole en la revuo **LF**. Andres BICKEL talente aktoris la stilekzercojn de Raymond Queneau, kiujn same talente esperantigis Istvan ERTL. Kaj ĉiuj ĝuis ankaŭ pri la 2 stilekzercoj, kiujn Andres BICKEL mem aldone verkis kaj dediĉis al la herooj Tell kaj Davel. Komencantoj kaj mezuloj en apartaj kunsidoj ek- aŭ pli-intimiĝis kun nia lingvo. Jam nun ni scias, ke sub la gvidado de Nicole MARGOT, Laŭzana Esperanto-Societo pretigas la programon de la venonta renkontiĝo okazonta eble en Evian la 26/27-ajn de septembro 1992. Eŭropa Komunumo estos ĝia temo.

La tria regiona kultura semajnfino okazis en **Lugano** la 30-an de novembro kaj 1-an de decembro 1991 en la belaj ejoj, kiujn la Lernejo Migros malavare metis je nia dispono. Andres BICKEL refoje aktoris pri la stilekzercoj de Raymond Queneau. Bona ideo redoni eblecon al aktoro prezenti sian programon antaŭ nova publiko. Dum la sabata posttagmezo kaj dimanĉa mateno Andy KÜNZLI tre interese raportis pri la nunaj eventoj en Sovetio, dum entuziasme studis komencantoj kaj mezuloj. Ankaŭ ni jam scias, ke la venonta Tiĉina semajnfino okazos la 5/6-ajn de decembro 1992 ree en Lugano. Ĝi estos medito pri la aktuala situacio de esperanto. Jam antaŭdankojn al gesinjoroj Teresita kaj Tazio CARLEVARO kaj al ties kunlaborantoj pro ilia sindono. Ni ankaŭ sciigu, ke la

12/13-ajn de septembro 1992 ankaŭ organizita de Tazio CARLEVARO okazos migrada semajnfino en la ĉirkaŭĵo de Airolo.

Kun Angelo MELLINI kaj membroj de Lucerna Esperanto-Societo ni ekzamenos, kiuj allogaj loko kaj programo povos alkurigi ĉiujn en Alemanion en novembro 1992.

## Prelegvojaĝo de d-ro Erich-Dieter KRAUSE

Jam en la dua duono de la jaro 1990 Fritz LIECHTI komencis organizi la prelegvojaĝon de d-ro Erich-Dieter KRAUSE. Laŭ la invito de SES kaj de agadfonduso, la prelegisto venis kun sia edzino. La preleg-aranĝo okazis inter la 29-a de majo kaj la 11-a de junio 1991 kaj kondukis gesinjorojn KRAUSE laŭ antaŭdecidita plano la 29-an de majo en Wil, la 30-an en Basel, la 31-an en Neuchâtel. De la 1-a ĝis la 3-a de junio gesinjoroj KRAUSE estis la gastoj de la SES-prezidanto. En La Chaux-de-Fonds ili vizitis CDELI-n kaj KCE-n, antaŭ ol migradi sur la monto Creux-du-Van. Okazis intervjuoj ĉe Svisa Radio Internacia en Bern kaj prelego en Vevey okaze de regiona renkontiĝo grupiginta tridekon da personoj el tuta Romandio. Pluraj el ili estis jam vojaĝintaj en aziajn landojn. Poste d-ro KRAUSE daŭrigis sian prelegvojaĝon. La 4-5-ajn de junio li estis en Luzern, la 7-8-ajn en Bellinzona kaj la 10-an konkludiĝis la aranĝo en Zürich.

La reagoj al la prelegoj de d-ro KRAUSE diverĝas laŭ la konsisto de la aŭskultintoj. Dum la averaĝa publiko sin diris tre interesita, la fakuloj esprimis kritikojn pri la malbona kvalito de granda parto de la lumbildoj, kiuj entute ne estis plu aktualaj. La vojaĝo de d-ro Krause okazis antaŭ pli ol deko da jaroj. Koncerne Indonezion mem kaj la tiean lingvan situacion ege interesan por esperantistoj, pluraj antaŭvidis pli sciencan prezenton. Tio montras plian fojon, kiom malfacile estas prelegi antaŭ la esperanto-publiko ne nur ege eterogena lingve, sed ankaŭ kulture. Verŝajne pro sia orientgermana deveno d-ro KRAUSE subtaksis la nivelon de multaj svisaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis pluraj bonaj konantoj de la aziaj landoj,

kio certe maloftis en la komunista orienta Germanio.

Por ŝpari al la grupoj senteblajn elspezojn, la administrantoj de la agadfonduso decidis transpreni la vojaĝkostojn. Superrigardo al la tuta aranĝo konstatigas, ke tiu prelegvojaĝo estis organize sukcesplena, kaj ni esperas, ke aliaj prelegvojaĝoj povos esti organizitaj. Dankojn al Fritz LIECHTI pro la modela organizo de la tuta prelegvojaĝo.

## Reviglig̃o de Kultura Centro Esperantista

Okaze de la Ĝenerala Asembleo de KCE la administranto Mario LÉPINE anoncis, ke KCE reprenas je sia ŝarĝo la elspezojn, kiujn kaŭzas la perkorespondaj kursoj, kontraŭe al tio, kio okazis en 1990. Argus restas je la ŝarĝo de SES. Tiel klariĝas la rilatoj inter ambaŭ asocioj koncerne tiujn gravajn servojn.

## Reviglig̃o de Junularo Esperantista Svislanda

Ni ĝojas konstati, ke en 1991 rekomencis agadi la junularo sub la vigla gvidado de Marion GROSJEAN, kaj ni fieras, ke sekve al la alvoko de JES aldonita al nia januara **SES informas**, SES-anoj malavare respondis per signifaj donacoj, kiuj jam atingis SF 915.- komence de februaro 1992. En sia kunsido de la 8-a de februaro 1992 la Centra Komitato decidis apogi la aktivecon de JES per jara subvencio de SF 1'000.- Tiu mono interalie helpu al la rilatoj kun aliaj junularaj sekcioj kaj al la mildigo de vojaĝelspezoj.

## Gazet-artikoloj kaj rebata servo

Pere de Argus ni ricevas gazet-artikolojn, kiuj rilatas al esperanto en la svisa gazetaro. Tio ebligas tuj reagi okaze de fuŝinformado pri nia movado. Rebat-agadon ni devis entrepreni koncerne artikolaĉon de Marc LACAZE aperintan je la 24-a de novembro 1991 en la nova

taggazeto "Le Nouveau Quotidien". Jam nun sentiĝas la pozitivaj rezultoj de tiu kunordigita agado kaj ni dankas al ĉiuj, kiuj akceptis skribi leteron al la redakcio de la koncerna ĵurnalo.

## Elektoj ne estas necesaj ĉijare

La membroj de la Centra Komitato kaj la kaskontrolantoj akceptas daŭrigi sian laboron. Tial ĉijare ne okazos elektoj.

## Alvoko al pago de la kotizo 1992

Jam kun la januara numero de **Svisa Esperanto-Societo informas**, vi ricevis pagilon, por ke tuj komence de la jaro 1992, ĉiu povu pagi sian kotizon. Ĝi restas senŝanĝa kaj la Estraro ne proponas ŝanĝon por la posta jaro 1993-a.

La **membrokotizoj** (kiuj inkluzivas ricevadon de la organoj **Literatura Foiro** kaj **Svisa Esperanto-Societo informas**) jare estas po **SF 50.-** por persono. (Infanoj kaj geknaboj ĝis 18 jaroj: po **SF 5.-**; junuloj ĝis 26 jaroj: po **SF 30.-**; Pensiuloj: po **SF 30.-**; geedzoj: po **SF 75.-**; geedzoj pensiulaj: po **SF 45.-**. **Poŝtĉekkonto:** 80-2372-3 Schweiz. Kreditanstalt 8022 ZH-Rathausplatz (por la konto 653677-40 Svisa Esperanto-Societo).

Per persona letero la prezidanto kontaktos la membrojn, kiuj forgesis pagi sian kotizon en 1990 kaj en 1991, kun la espero, ke tiuj kontaktitoj sendos sian kontribuaĵon por povi resti informataj pri la aktivecoj de SES. Ekde la komenco de la monato majo ni ĉesos sendi la organojn de SES al la kotizintoj.

Vasta agado provos varbi novajn membrojn al SES. Ĉiuj frekventantoj de esperanto-kursoj kaj ĉiuj izolitaj esperantistoj, kies adreson ni povos rikolti, estos informitaj pri la apogindaj aktivecoj de SES, kun la espero, ke ili membriĝos jam en 1992. Ni alvokas ĉiujn kursestrojn, grupprezidantojn kaj aktivulojn partopreni tiun agadon per la alsendo de la nomoj kaj adresoj de ĉiuj novaj esperantistoj, ke ni povu ilin tuj kontakti per informa

letero. Esperanto progresos ĉefe se ni kapablos unuigi niajn fortojn kaj strebadojn.

## Ĉiuj al Olten

Al ĉiuj SES-anoj ni rememorigas, ke ili estas kore invitataj partopreni al la Ĝenerala kunveno, kiun ni malfermos la sabaton 14-an de marto 1992 precize je la 11h00.

Post la komuna tagmanĝo okazos du paralelaj posttagmezaj programoj. Claude GACOND, kiu esperantiĝis en 1952, rakontos pri sia 40jara esperanto-vivo. Kaj Marion GROSJEAN, la prezidantino de JES, gvidos promenadon en la urbo Olten. Kaj la libro-servo de KCE prizorgata de Nicole MARGOT ebligos al ĉiu akiri novajn librojn.

## Dankoj

Ni dankas la donacintojn pro ties malavareco, la kotizintojn pro ties subteno, la kunlaborintojn kaj partoprenintojn al la regionaj kulturaj semajnfinoj, la membrojn de la Estraro kaj de la Centra Komitato pro ties sindono, la partoprenontojn al la Ĝenerala Kunveno pro ties konsiloj.

## Antaŭen

La jaro 1992 ebligu al nia societo fari novajn paŝojn antaŭen. Kiel ni diris komence de tiu raporto, solviĝis la organa problemo. Nun fariĝas tradiciaj niaj regionaj kulturaj semajnfinoj. Alvenis la momento vastskale varbi novajn membrojn al nia societo, kiu reale proponas ion pozitivan. Kaj ankaŭ alvenis la momento diskuti en regionaj krokodilaj kunvenoj pri informaj agadoj. Tion ni ekfaros per la kunvoko de la **Federa Konsilio,** kiu, kontraŭe al la statuta devontigo, ne estis kunvokita dum la pasintaj jaroj. Ni havis tro da solvotaj punktoj por povi entrepreni ion vastskalan tiurilate. Ĉiuj prezidantoj de la esperanto-

organizaĵoj, kies sidejo troviĝas en Svislando, estos baldaŭ kunvokitaj al kunsido gastigata de KCE, kiu okazos la 29-an de aŭgusto 1992 en La Chaux-de-Fonds.

La Estraro de la Centra Komitato kreos laborgrupojn - po unu por lingvo -, kies preciza tasko estos prizorgi la pretigon de propaganda materialo. Ni esperas, ke jam en 1992 ekfruktos tiu laboro, kiu estis neglektita ĝis nun.

*Universalaj Kongresoj okazis 7 fojojn en Svislando:* en 1906 en Ĝenevo, en 1913 en Berno, en 1925 denove en Ĝenevo, en 1939 kaj en 1947 denove en Berno kaj en 1979 en Lucerno. Andy KÜNZLI estis komisiita de la Centra Komitato por ekzameni, kiam kaj kie povos reokazi Universala Kongreso en Svislando kaj por startigi laborgrupon.

## Kaj pri la Ĝenerala Kunveno 1993

Ni tre esperas, ke loka societo aŭ izolita esperantisto alportos sian kunlaboron por la organizo de nia Ĝenerala Kunveno okazonta la venontan jaron la 13-an de marto 1993. Kial ne imiti la lucernanojn, kiuj invitis nian kunvenon en 1991 kaj aldonis semajnfinan kulturan programon? La Centra Komitato decidis, ke se ne venos invito la kunveno principe disvolviĝos en Olten. Ĝis la venonta Ĝenerala Kunveno ni esperas, ke la SES-prezidanto ricevos principan inviton por la jaro 1993.

Nome de la Centra Komitato:
La Prezidanto: Claude GACOND

-oOo-

LASTMOMENTA INFORMO:
La 6-an de februaro 1992 mortis, abrupte pro koratako, Alexander Thaler el Ebnat-Kappel, 69-jara. Li estis emerita instruisto kaj aktiva membro de la Esperantoklubo Wil. -St.Pochanke-

*** Redaktfino de SES INFORMAS n-ro 3/1992 estas la 13-a de aprilo 1992. ***